



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Julio: 1 2023

APELACIA KORTUMO DE LONDONO RIFUZAS DECIDON DE LA REGISTRARO PRI DEVIGA FORSENDO DE ENMIGRINTOJ

La apelacia kortumo de Londono ĵus juĝis, ke Ruando “ne estas sekura tria lando” se oni celas sendi en ĉi tiun afrikan landon tiujn enmigrintojn, kiuj atingas ne-leĝe la britan marbordon, laŭ projekto de la nuntempa brita konservativa registaro. La kortumo de tri juĝistoj decidis, ke la sistemo pri azil-petado de Ruando suferas seriozajn mankojn, kiuj povas kaŭzi retrosendon de la azil-petantojn en la landojn el kiuj ili fuĝis.

La registaro de la premiero Rishi Sunak subskribis akordon kun Ruando, laŭ kiu estas eble sendi tien enmigrintojn kiuj venas pere de malgrandaj boatoj ĉefe de Francio. La registaro apelacios tiun juĝon ĉar, laŭ ĝi, la ruanda registaro garantiis, ke tiuj azil-petantoj akceptitaj en la afrika ŝtato ne estos resenditaj en triajn landojn.

Tamen tiu aserto ne akordas kun la juĝo de la apelacia kortumo, tiel la juĝisto Ian Burnett klarigis, nome de la ceteraj juĝistoj, ke la mankoj de la jura ruanda sistemo povas okazigi realan riskon al azil-petantoj, kiuj povus esti resenditaj en siajn originajn landojn



Enmigrintoj atingas britan marbordon per malgrandaj boatoj

kaj tie suferi torturojn aŭ persekutojn. La respondeculino pri internaj aferoj de la brita registaro, Suella Braverman, deklaris, ke la nuntempa azil-sistemo en Britio estas tute ĥaosa. Laŭ ŝi dum la pasinta jaro venis 12.000 albanoj el Francio, tamen ili petis azil-raĵton en Britio, malgraŭ la fakto, ke ili venis el sekura ŝtato membro de la Eŭropa Unio, t.e. Francio. Laŭ Bravermann Britio ne povas akcepti pliajn boatojn nome de erara humana agado.

Male, la projekto de la konservativa registaro sendi en Ruandon ne-leĝajn enmigrintojn, ricevis kritikojn de la laborista partio kaj ankaŭ de porhomaj organizoj.

Vorto de la Semajno

DECIDI: (tr)

Meti finon al diskuto, proceso, demando kaj simile, venkigante unu el la partioj.

Decido: Ago de decidanto. Io decidita.

Juĝdecido: Verdikto.

Sinonimo: determini, veni en akordon.

La tribunalo decidis, ke oni ne povas kondamni la akuziton.



Komputilaj problemoj daŭre okazis dum la lastaj monatoj kaj ni ne sukcesis eldoni la bultenon **JURA SEMAJNO** ĝustatempe, pro tio ni ree pardonpetas. Espereble ĉio jam solviĝis, do ni estos ĉe via komputilo daŭre dum kuranta monato julio.

**AVIZO POR ĈIUJ JURISTOJ PARTOPRENONTOJ EN LA
VENONTA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - TORINO
(Italio) 2024**

Internacia Jurista Esperanto-Asocio okazigos sian jaran renkontiĝon kadre de la venonta Universala Kongreso. Laŭ la programo decidita, okazos prelego pri jura temo, diskuto pri la nuntempa situacio de la asocio kaj venontaj agadplanoj kaj prezento de nova numero de la revuo *Jura Tribuno Internacia*. Poste okazos renkontiĝo de la asocio de Advokatoj Esperantlingvaj. Do, se Vi ĉeestas en Torino la venontan Universala Kongreson, estu atenta al tieaj informiloj por scii kiam kaj kie okazos la kunveno de la jurista asocio.